Robo havas la saman originon kiel *rabi* kaj *ravi*. Vi ja scias, sinjorino, ke robo povas esti rava, sed eble vi ne jam aŭdis, ke la franca vorto *robe* komence signifis vestojn rabitajn de la malamiko en milito.

Gamaŝoj estas nomitaj laŭ la nordafrika oazo *Gadames*. Ke *mokaseno* estas amerik-indiana vorto, estas ja sufiĉe konata fakto.

AMERIKA ESPERANTISTO

Ĉapelo, *ĉapo* kaj *kapuĉo* havas la saman latinan originon kiel *kapo*, *ĉapitro* kaj *ĉeĉo*. *Makintoŝo* estas pluvmantelo ricevinta sian nomon de la skota eltrovinto *MacIntosh*.

Pijamo estas vorto orient-hinda, *sarongo* malaja, *kimono* japana, *turbano* persa (samorigina kun *tulipo*). *Kamizolo* havas la saman araban originon kiel *ĉemizo*. *Ŝalo* kaj *kaf-tano* estas persaj vortoj, *ŝuo* kaj *ŝtrumpo* germanaj, *vesto* kaj *veŝto* latinaj; *sandalo* estas grekdevena.

Korseto kaj *korsaĵo* havas la saman latinan originon kiel *korpo*. *Zono* estas greka, *ŝelko* estas pola vorto. *Pelto* estas latina, *mufo* germana.

Kravato estas *kroata* (jugoslava) vestaĵo.

La materialoj, el kiuj la vestoj konsistas, venas el multaj landoj. Tial iliaj nomoj estas prenitaj el multaj lingvoj. *Kotono* estas araba vorto, *silko* kaj *serĝo* signifas "ĉina" (lat. *sericum*), *daŝmasko* estas nomita laŭ la famkonata ĉefurbo de Sirio, *kaŝmiro* laŭ la monta ŝtato en Hindujo, *kalikoto* laŭ la hinda havenurbo Calicut. *Lano* kaj *lino* estas latinaj, *ledo* irlanda, *kaŭĉuko* amerik-indiana. *Nilono* estas artefarita vorto fabrikita en Usono, *raĵono* artefarita vorto fabrikita en Francujo.

—W. S.

KANADA INFORMO

Diversaj Kanadaj Gazetoj publikigis inform-leterojn pri Esperanto lastatempe. En Toronto, la *Daily Star* aperigis leteron de F. Kaeble, la *Globe & Mail* presis leterojn de *Edis Fairbairn* kaj *Dez. Hackett*. Leteroj de *Hugo Gerisch* ofte aperas en la loka gazeto de Picton.

La *Toronto-Esperanto-Klubo* prezentas regulan programon de kunvenoj, festoj, kaj eĉ eldonas malgrandan bultenon por sia membraro. En Decembro ili festis Zamenhof-Tagon, kun paroladoj de *David Jenkins* kaj *Edgar Mould*. Ankaŭ troviĝis muziko.

C. C. Macdonald, Fort William, Ont., paroladis al la Rotario-Klubo en tiu urbo kun granda sukceso. Aperis longa artikolo en la tagjurnalo pri Esperanto. *S-ano Macdonald* nun preparas starigon de Esperanto-kurso tie.

AMERIKAJ IMPRESOJ

JULIA ISBRÜCKER

La komforta, luksa ŝipo "Nieuw Amsterdam" portis min al la lando, al kiu nuntempe ĉies okuloj estas direktitaj, la lando, kiu tiel multe helpis en la liberigo de Nederlando kaj dum la mallumaj tagoj post la milito. La unua persono, kiun mi renkontis en la ŝipo, estis bona, simpatia Esperantistino, F-ino Mary Gassler, Nederlandanino, kiu deĵoras en la ŝipo kiel telefonistino. Kuraĝiga komenco!

La elŝipiĝo ne iris tre glate; sufiĉas diri, ke la ŝipo alvenis je la kvina kaj duono posttagmeze kaj ke mi povis forlasi la doganejon je la 10-a horo vespere, kaj miaj kompatindaj geamikoj, Gesinjoroj Connor, atendadis, atendadis sur la malvarma strato. Sed kia feliĉo revidi ilin kaj havi la senton, ke oni ne plu estas fremdulo en tiu giganta lando.

Malfacile estas doni en orda sinsekvo miajn impresojn. Sed unu impresio elstaras super ĉiuj aliaj: kiom da bonaj, vere bonaj homoj mi renkontis ĉi tie. "Bonaj homoj", tiuj vortoj preskaŭ ne plu signifas ion, — sed ni devas konsciiĝi, pri tio, ke "bona homo" estas la nura luma punkto, la nura espero por la estonteco, la plej granda valoro, la nura kondiĉo por veni al pli bona mondo. Mi ne citos nomojn; ili ne ŝatus tion, sed ili devas scii, ke mi estas profunde tuŝita pro la akcepto, kiun mi trovis ĉi tie. Eble la eŭropaj virinoj pensas, ke la amerikaj mastrinoj facile povas esti gastamaj, ili havas komfortan domon, multajn manĝaĵojn, k.t.p. — tio estas vera, sed ili havas nenian helpan tion, ili devas ĉion fari mem, kuiri, lavi, purigi la domon, fari la aĉetojn kaj manipuli la diversajn maŝinojn, kaj tre multaj el ili havas krom tio oficon. Matenmanĝo, lunĉo kaj tagmanĝo estas zorge preparataj, kio postulas multan tempon. Mi konfesas, ke mi ankoraŭ nenie en Eŭropo tiel ŝatis la manĝaĵojn. Kompreneble la materialo estas unuaranga kaj post la milito ni ne trovis tion en multaj eŭropaj

landoj. Vere la amerika virino, same kiel la franca virino multe pli laboras ol la nederlanda. Kaj malgraŭ tio la amerika virino estas bonega gastigantino. Oni sentas sin tuj hejme. Mi ĝuste trafis la antaŭ-Kristnaskan tempon. Ĉio turniĝis ĉirkaŭ la preparoj por la plej granda festo de la jaro, kiu tute similas al nia Sankta-Nikolaa festo. La butikoj estis grandiozaj, magazenoj de 14 etaĝoj, plenplenaj de la mateno ĝis la vespero. Kia abundo ĉie! La urbo vespere estas unu lumanta foiro, kaj tamen Novjorko donas la impreson de trankvileco kaj ordo. Policianojn oni preskaŭ ne vidas. La grandega trafiko estas regulata per trafiklumoj kaj ĉiu tenas sin precize al la reguloj; devas fari tion, ĉar unu eraro kaŭzus katastrofon.

Ankaŭ la gigantaj nubskrapantoj, per sia bela simpleco, elspiras trankvilecon kaj memfidon. Kaj la homoj same memfidaj, trankvilaj; la Amerikano ne rapide ekcitiĝas, kaj li prenas la aferojn de la humora flanko. Mi estis en diversaj rondoj kaj ĉie regis tiu agrabla sfero de homoj, kiuj ne timas perdi sian dignecon. Mi estis en "cocktail party", (oni rajtis trinki ankaŭ teon) en unu el la plej luksaj hoteloj de Novjorko kiel gasto de la Sroptimista Klubo kaj kiam la muziko ekludis konatan amerikan kanton, ĉiuj gaje ekkantis kun la muziko je granda ĝojo de la muzikistaro. Oni ne aplikas ceremoniojn kaj tuj nomas vin per la antaŭnomo, kio fortigas la senton esti hejme.

Mi jam al kutimiĝas al invito por lunĉo je la 65-a etaĝo aŭ viziti iun en ĉambro 1442 de iu hotelo. Estas ekspresaj liftoj, kaj liftoj kiuj haltas ĉe ĉiu etaĝo. Se iu loĝanto de la 32-a etaĝo deziras lunĉi en la 65-a, tiam li pli rapide povas unue malsupreniri al la ter-etaĝo kaj tiam preni la ekspresan lifton al la 65-a. La vivo ĉi tie estas pli laciga pro la teruraj distancoj. Iri lunĉi ĉe iu kaj sidi unu horon en la subtera vagonaro, posttagmeze paroli ie en duhora distanco kaj vespere viziti iun, kiu loĝas en unu-kaj-duonhora distanco, ne estas io eksterordinara ĉi tie. Por dek cendoj oni povas veturi la tutan tagon sub la tero.

AMERIKA ESPERANTISTO

Trafis min, ke la infanoj ricevas multan atenton ĉi tie, ekzemple en la vagonaroj okazas, ke la infano sidas kaj la patrino staras, eĉ infanoj ok ĝis 16-jaraj. En Nederlando estas eĉ aŭto en la tramoj, ke infanoj ĝis la 18-a jaro estas devigataj cedi sian lokon al pliaĝulo, kaj la patrinoj instruas al la infanoj tuj ekstarti por doni sian lokon al staranta plenkreskulo. La infanoj ĉi tie estas traktataj kiel gravaj personoj (prave kompreneble, sed laŭ niaj ideoj ili ne devus rimarki tion mem). La bona sekvo estas, ke ili estas tre memstaraj. Kiam mi parolis kaj donis Cseh-lecionon por la lernantoj de iu privata lernejo en New Jersey, la knaboj faris tiajn inteligentajn demandojn, ke mi miris pri la saĝeco de tiuj knaboj. La direktoro ridante diris post la fino, ke li timas, ke la knaboj ne plu volos lerni la hispanan kaj francan lingvojn, kiuj estas devigaj fakoj en tiu lernejo.

Ameriko estas lando de ekstremoj, diris al mi iu enmigrinta samideano. Apud multaj bonaĵoj ekzistas la mallumaj flankoj. Ekzemple regas granda infan-krimuleco, kaj en la grandaj urboj infankrimuloj ne estas esceptoj. La kinoteatroj montras ĉiajn krimulajn filmojn, kaj ne ekzistas ia malpermeso por infanoj vidi tiujn filmojn. En nia lando estas severa kontrolo je la filmoj kaj ĉiam estas indikite, ĉu iu filmo estas malpermesita por infanoj. Multaj amerikaj laborantaj gepatroj ĝojas, kiam la infanoj vizitas la kinoteatron, sed ili ne konsciigas pri tio, ke tie ili lernas multan malbonon. Aliflanke oni serioze okupas sin ĉi tie pri tiu problemo kaj multo estas farata por eduki la infanojn en alia direkto.

La ĝenerala impresio estas, ke Ameriko estas lando, tre prospera; simpla masonisto, laborante sub iu mastro, perlaboras minimume cent dolarojn en la semajno kaj li posedas sian propran aŭton. La homoj laboras multe, sed ili havas bonan vivon. Oni diris al mi, ke plejgrandparte la Amerikanoj vidas la vivon de la reala flanko kaj ne multe okupas sin pri spiritaj aferoj, sed mi konstatis, ke multaj estas praktikaj idealistoj kiuj estas pretaj kunlabori por la

AMERIKA ESPERANTISTO

interamikiĝo de la popoloj. Mi mire konstatis, ke ili tuj vidas la grandan utilon de Esperanto, ankaŭ por prepari pli pacan mondon. La ĝenerala penso estas, ke en Ameriko oni tute ne povas senti la bezonon de internacia lingvo, sed kiam mi diris tion al iu Amerikano, li respondis: Kompreneble la Amerikanoj sentas por Esperanto, ĉar ili malŝategas lerni lingvojn, kaj ili vidas en Esperanto facilan ilon por transsalti ĉiujn aliajn lingvojn por povi atingi la tutan mondon. Jen esperiga fakto! Nia tasko nun estas disvastigi Esperanton grandskale ĉi tie. Sufiĉas doni demonstracion de unu Cseh-leciono por entuziasmigi la publikon. Mi parolis por pli ol cent studentoj, kie parolis ankaŭ reprezentanto de UNESCO kaj du ĉinaj profesoroj. Mi finis per mallonga Cseh-leciono kaj ĉiuj, inkluzive la ĉinaj profesoroj entuziasme respondis ĥore. Fidele akompanas min S-ino Doris Connor, kiu brile tradukas kaj tuj gajnas ĉies simpatian. Gesinjoroj G. Alan Connor laboras jam ĉi tie kun granda sukceso. La kampo estas vasta, sed fruktodona!

Restas al mi ĉi tie danki, danki al ĉiuj, kiuj donacis al mi unu el la plej belaj spertoj de mia vivo.

“ AMIKO SKIPPY ”

“Amiko Skippy”, bone konata hundo de Joseph R. Scherer en fruaj tagoj de vojaĝado, ne plu vivas. “Skippy” komprenis tri lingvojn: anglan, germanan, Esperantan. Li subite mortis post kolapso en mia hejmo, noktmeze inter la dekunua kaj dekdua. Je la tago kiam nia grupo kunvenis en mia domo por festi la Tagon de Zamenhof, dimanĉe la 12an, ni enterigis “Amikon Skippy” en mia domkorto kun solena Esperanta honoro. Kun granda, ligna, verda stelo kuŝanta sur la koro de “Skippy”, ni metis lin en la malgrandan tombon. Alta flag-stango indikas la tombon, kaj ĉe la supro pendas malgranda flago de Esperanto.

—EDWIN SIEVERS, 2016 *W. Alexandrine, Detroit, Mich.*

DEZERTA NOKTO

Vera Sperto de ELBERT WELLS

Betino estas lupino. Kiam ŝi estis nur eta lupido, Johano Korbet, sperta ĉasisto kaj kaptilisto, elfosis ŝin el la patrina kuŝejo. Depost tiam, ŝi pasigis sian vivon ligita je la fino de ĉeno — malpeza sed forta. Sed, ho ve, la alia fino de la ĉeno estis ĉiam ligita al iu objekto, kiel nun al la akso de veturilo.

Betino dormas trankvile inter la du malantaŭoj radoj de la veturilo. Baldaŭ ŝi movetas sin iom, kaj dum ŝi kuŝas, levus unu orelo por aŭdi pli klare la sonojn de violono ludata en la manoj de Johano Korbet. La sonoj svebas en la brila lunlumo.

El mia lito mi povas vidi sinjoron Korbet, dum li atente rigardas la lupinon. Li tiras la arĉon jen sur unu, jen sur alia kordo de sia malnova, kaduka violono. Mia lito estas la volvaĵo de vakero, metita sur la sablon proksime al tufo de kakto, kvindek futojn for de la veturilo de Johano Korbet. Mi estas invitita pasigi la nokton kun la ĉasisto, dum mia resto en la dezerta regiono de Tekso. Mi jam enlitiĝis. Sed Korbet klarigis, ke li sekvos mian ekzemplon nur post li finas "la serenadon al Betino". Mi observas lin dum li sidas sur roko apud la veturilo. Li vagas per la arĉo, hezite kaj eksperimente, sur la kordoj de la violono.

Kiam li vidas, ke la sonoj — ie inter la mezaj kaj malaltaj tonoj — ŝajne kaŭzas al Betino la plej multan ekciton kaj ĝenon, li restas en tiu serio, rigardas intente la reagojn de Betino, kaj komencas emfazi iun apartan noton, donante al ĝi iom diferencon nuancon de sono — jen pli laŭta, jen pli mallaŭta, jen pli intensa, jen malpli intensa.

Betino ruliĝas de sia flanko al sia stomako, kapo streĉita kaj ambaŭ oreloj etenditaj. Korbet persiste flegas tiun saman noton, observante ŝin intente. Betino leviĝas, krietas, turniĝas kelkfoje, komencas kuŝiĝi denove, sed nerveme restas sidanta, atenta, streĉa. Korbet persistas, iom plialtigas

AMERIKA ESPERANTISTO

la sonon, iom male, premante pli peze per la arĉo. En evidenta malkomforto Betino bojetas. Korbet preme tenas al tiu plorema noto. La sono tre videble turmentas la animon de la lupino. Kun subita ekbojo, ŝi turniĝas dufoje. Ŝi levas la nazon, ne rekte supren sed inkline supren, kaj nun daŭre kaj sovaĝe elverŝas al la nokta aero strangan, raŭkan torenton de lupa malfeliĉo, sopiro kaj izoleco — sonon kiu vibretas, vibras, pliintensiĝas denove kaj denove, dum la violono, mallaŭte sed senhalte nun, torturas ŝin.

Mi ne povas vidi la vizaĝon de Korbet sed mi estas certa, ke li ridetas: "Se tiu virlupo, Du-Piedfingro, estas eĉ kvin mejlojn distance, li aŭdas tiun lastan bojadon!" li diras, metante la violonon en la malpuran kusen-kovrilon, kiu servas kiel ĝia ujo.

"Kiom da kapt-mono vi ricevus por la skalpo de tiu Du-Piedfingro?" mi demandas.

"Ne estas la skalpo kiu interesas min, sed tiu dupiedfingra malantaŭa kruro! La ranĉistoj en du ŝtatoj volonte donos premion de kvarcent dolaroj al la persono kiu kaptas Du-Piedfingron. Jam la ŝafoj, kiujn tiu malbonulo mortigis nur por distro, depost la tempo kiam li perdis siajn aliajn piedfingrojn en mia kaptilo, ebligus . . ." Subite Korbet haltas, kaj tenas avertan fingron por silento, dum Betino elsaltas de la tero, streĉa kaj atenta, kaj turnas sin rekte al la montetoj en la nordo — mejlojn for, sed nedefinite videblaj en la lunlumo.

Mi aŭdis neniun sonon, sed mi levas la kapon kaj apogas min sur la kubuto. Kaj jen, al miaj oreloj venas de mejloj for — kaj mi sentas, ke la haroj sur la nuko leviĝas — la raŭka, vibra, responde krio de vir-lupo, elstara, defia, en tono pli malalta ol la plej malalta bas-kordo de bas-violono. Dum mi aŭskultas, la bojkrio flugas en grandaj ondoj de pulsanta sono. Baldaŭ ĝi for-mortiĝas, dum la ejoj kaj aero modulas ĝin — kaj fine ĝi malaperas en la silenton de la dezerta nokto, lasante nur lunlumon kaj ombrojn.

"*Estas li!*" triumfe diras Korbet. "Nur tiu Du-Piedfingro

AMERIKA ESPERANTISTO

povas tiel bojegi." Kaj post paŭzo, "Inter nun kaj la malleviĝo de la luno, li direktos sin ĉi tien, vagante laŭlonge de la kontraŭ-lupa barilo je la okcidenta flanko de la ranĉo 'Ĝemelmonto'. Mia plej granda kaj plej bona kaptilo estas ĝuste tie, kie pasintfoje li komencis elfosi truon por subpasi la barilon. Li haltos ĝuste tie, kaj penos pli profunde fosi tiun truon — mi esperas!"

Kaj mi, kuŝante ĉi tie en mia lit-volvaĵo, estas duone esperanta, pro ia nedifinita kaŭzo, ke Du-Piedfingro ne faros tion.

— *Tr. DTC*

SEP FRATOJ, de *Aleksis Kivi*, (tr. Ilmari Ekstrom). Eldonis Vilho Setälä. Akirebla ĉe EANA, bindita \$3.50, broŝurita \$2.75, afrankite.

Unu el la ĉefverkoj de finna literaturo, "*Sep Fratoj*", aperas en verda vesto. Kun granda scivolemo mi atendis la verkon, ĉar oni ja heroldis ĝin kiel gravan akiraĵon por nia literaturo. Mi konfesu, ke iom dube mi priatentis tian fanfaronadon.

Mi komencis la legadon, kaj vere mi tiom interesigis pri la sep fratoj, ke tre rapide mi finlegis la 360-paĝan libron. Plene mi konstatis, ke jen estas ĉefverko. Temas pri sep junaj fratoj — kiuj heredis bienon, sed al kiuj ne plaĉis tiu stabila kaj seninteresa vivo — kaj tial ili rifuĝis al la arbaroj. Plue instigis ilin, ke oni devigis ilin lerni kiel skribi kaj legi, kaj la abocolibro terurigis ilin.

Kaj, kiajn aventurojn ili spertis tie, meze de la amataj arbaroj! Laŭ ilia kanto:

*Ciam fartis bone ni bivake ĉe rivero,
fajro estis imperi', kaj akvo la biero.*

Sed ne ĉiam iris tiel flue kaj harmonie la vivo. La ĉasado ofte fariĝis danĝera; fajron kaj froston ili devis kontraŭbatali; ili kverelis inter si — sed tamen unuiĝis kiam minacis danĝero. Sed malgraŭ la vivo sovaĝa, ili posedis bonan karakteron. Post iom da jaroj ili maturiĝis ne nur korpe sed ankaŭ mense. Ili konstruis fruktodonajn bienojn, diligente trastudis la malamegitan abocolibron kaj la Biblion; eĉ prenis edzinojn kaj fariĝis bonaj kaj estimataj anoj de la homa socio. Kiamaniere ĉio tio okazis, vi mem legu la libron.

— *Wm. P. Vathis.*

BEST ESPERANTO BOOKS AT REASONABLE PRICES

Here is a list of books from Sweden, noted for excellent Esperanto style, and best quality paper, printing and binding. The prices are right, too! For example, compare the *Sveda Antologio* with those of other countries. It is de luxe from paper to cloth cover, at only \$3.75. Or, compare the superb cloth-bound novel, *Gösta Berling*, by Selma Lagerlöf, at \$3.00, perfectly manufactured, free from Anglicisms, and a credit to our movement. We highly recommend these books. Order several titles now, from *American Esperantist Book Service*, 114 West 16th Street, New York 11, N. Y.

Note, that when you buy books from *American Esperantist*, all profits are used to give you a better magazine and a better Central Office for E.A.N.A.

<i>Originala Esperanta Legolibreto</i> , Widstrom, 46 pp. many little stories & essays, well recommended reader15
<i>Kudlago, la malgranda eskimo</i> , Hichtum, 40 pp. delightful story of native youth in Greenland, quite easy30
<i>Barbro kaj Eriko</i> , Schneider & Carlsson, 40 pp, il, little romance bet. Alois & Magda thru model letters25
<i>Bengalaj Fabeloj</i> , Sinha, 40 pp, three very interesting exotic fabels from India, by Hindu Esperantist30
<i>Dialogoj kaj Komedietoj</i> , Dahl, 32 pp, ten easy diverse short playlets for Esperanto meetings and courses25
<i>Dua Rapsodio</i> , compiled by Szilagyi & Elg, 48 pp, excellent variety storiettes, Espo language & movement70
<i>Tria Rapsodio</i> , compiled by Szilagyi, 48 pp, third collection of important stories, fabels, essays, etc.70
<i>Kvara Rapsodio</i> , compiled by Szilagyi, 48 pp, fourth compilation of interesting variety from famous authors70
<i>Bargain</i> in best possible reading and Esperanto information: <i>Dua, Tria, Kvara Rapsodioj</i> , all 3 books for.....	1.90
<i>La Esperanto-Klubo</i> , Malmgren, 48 pp, crammed with ideas for organizing clubs, programs, fun, courses, etc.25
<i>Al Torento</i> , Engholm, 2nd ed, 93 pp, original novel of life in a Swedish industrial village, simple style50
<i>Gösta Berling</i> , Selma Lagerlöf, 552 pp, complete 2 parts in 1 de luxe cloth-bound vol., world-famed novel	3.00
Same volume, except bound in 3-color heavy paper	2.35
<i>Infanoj en Torento</i> , Engholm, Part 1 & 2, 2 vols, 100 pp & 144 pp, remarkable story, simple style. Both for	1.70

AMERIKA ESPERANTISTO

<i>La Fino</i> , Count Folke Bernadotte, complete il. popular edition, account of German negotiations during war.....	1.00
<i>La Granda Aventuro</i> , & other original stories, Szilagyí, 144 pp, sprightly "Stelolibro" edition, bound volume	2.25
<i>La Konscienco Riproças</i> , August Strindberg, 59 pp, novel of moral conflict, by great Swedish author, only30
<i>La Ringo de la Generalo</i> , Selma Lagerlöf, 127 pp, novel, one of most brilliant works, in superb translation75
<i>Pasko</i> , August Strindberg, 88 pp, drama in three acts, famous dramatic work, translated in simple style60
<i>Sveda Antologio</i> , ed by Jansson, Beckman, Lenner, 2 vols in one de luxe book, gold stamped, bound in cloth	3.75
<i>La Homaj Rasoj de la Mondo</i> , Nordenstreng, 212 pp, 140 il, incl. nudes, comparing characteristics all races	1.35
<i>Tra Sovaga Kamcatko</i> , Sten Bergman, 277 pp, richly il, life in Siberian peninsula, far northeast Russia	1.75
<i>Sonoj kaj Vortoj en Esperanto</i> , Paul Nylén, 40 pp, important commentary on pronunciation & wordbuilding.....	.60
<i>Kvindek Jarojn kun Paul Nylén</i> , 64 pp, 8" x 11", every page richly il, a "book-film" of Espo events during life of this great pioneer, 1892 thru 1942, history, congresses, authors, great events, projects from Volapük to IALA. A "must" for every real Esperantist75
<i>Kaj Ĉio Restas Penso sed Ne Faro</i> , Lakshmiswar Sinha, 15 pp, essay on understanding & human brotherhood25

Sveda Esperanto-Gazeto "La Espero"

The magazine of the Swedish Esperanto movement, "*La Espero*", is beautifully printed, chiefly in Esperanto, and issued regularly every month in 8, 12, or 16 pages. Subscribe through AE Book Service. "*La Espero*", yearly subscription

\$1.70

(Here are subscription rates to other magazines.)

<i>The British Esperantist</i> , bi-monthly	\$.85
<i>La Praktiko</i> (magazine of UL)	2.50
<i>La Juna Vivo</i> , TJO, monthly	1.25
<i>Literatura Mondo</i> , bi-monthly	3.00
<i>Heroldo de Esperanto</i> , twice a month	4.00
<i>Internacia Kulturo</i> , (Bulgarian Leftist Magazine)	2.50

Note, that when you order your Esperanto magazines through *American Esperantist*, all commissions are used to give you a better AE and a better Central Office for E.A.N.A.

ESPERANTO-KRONIKO

MOSAMO, tre vigla Esperanto-grupo en 'Missouri School of Mines', Rolla, Mo., konstante antaŭenigas Esperanton sub gvidado de *John M. Brewer*. Ili sukcesis enkonduki 15-minutan radio-programon, ĉiusemajne, en Stacio-KTTR, merkrede je 7:45 p.m., kun Esperanto-informoj kaj lecionoj. Esperanto-libroj troviĝas en la publika biblioteko; lokaj ĵurnaloj ofte presas informojn pri Esperanto-aferoj; kaj — ne malplej grava por Esperanto en Ameriko — la membroj de Mosamo aliĝas al EANA.

En Denver, Colorado, *D-ro W. Solzbacher* klarigis la necesecon kaj utilecon de Esperanto, en prelego pri "Mondaj Problemoj" en la Kongreso de la Katolika Studenta Asocio pri Gazetaraj Aferoj. Post la parolado, redaktoroj de kelkaj gazetoj esprimis intereson pri Esperanto.

Montezuma Mountain School for Boys, Los Gatos, Calif., plej daŭre kaj regule instruas Esperanton, sub la sperta Prezidenteco de *Prof. E. A. Rogers*. Li raportas, ke ĉiujare la tuta klaso en la oka stud-jaro lernas Esperanton. La plenaĝuloj, inkluzive de la instruistaro, ankaŭ studas la interlingvon, por tiu celo uzante la novan libron, "Esperanto — The World Interlanguage".

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio, TEKA, iam tre aktiva en la movado, nun estas reorganizata. Kuracistoj, dentistoj, farmaciistoj, ktp, skribu al *D-ro Paul Kempeneers*, 19 Avenue Montjoie, Bruxelles, Belgujo.

New York Herald Tribune enhavis du longajn leterojn pri Esperanto, en aŭtuno. Unu estis de *Mark Starr*, Eduka Direktoro de ILGWU, kiu menciis siajn spertojn pri la praktika uzo de Esperanto en Japanujo, kien li iris kiel konsilisto pri laboristaj aferoj laŭ invito de Generalo MacArthur. La alia estis de *D-ro W. Solzbacher*, Prezidanto de EANA, kaj pritraktis la uzon de Esperanto en internaciaj radio-programoj, ĝian instruon en lernejoj, la Esperanto-gazetaron, kaj la neŭtralecon de la lingvo.

ESPERANTO-KRONIKO

Peter Heitkamp, Vincennes, Indiana, aranĝis ekspozicion pri Esperanto en la altlerneja biblioteko. Kelkaj studentoj interesiĝis pri la interlingvo, kaj nun troviĝas nova Esperanto-grupo sub la gvidado de Petro.

Ni funebras: Jam en AE Bulteno ni presis pri la granda perdo de Prezidanto *Edwin L. Clarke*, per subita morto je 15-a Septembro. Tre malĝoje ni ricevis informojn pri la morto de tri aliaj pioniroj en Esperantolando. La 2-an Oktobro, forpasis *George Winthrop Lee*, Concord, Mass., 81-jara Li multe laboris en la plej fruaj tagoj de EANA, kiel Sekretario, Help-Redaktoro, ktp. Dum multaj jaroj li estis Prezidanto de Bostona Esperanto-Societo, kaj tenis al propagando por Esperanto ĝis la fina tago. Alia multamata samideano, *S-ino Fannie A. Baker*, Troy, Pa., 87-jara, mortis 27 Julio 1948. Kaj *Hugh I. Keyes*, Uniontown, Pa., 78-jara, mortis 10 Septembro 1947, viktimo de aŭtomobila akcidento.

"*Esperanto—The World Interlanguage*", la nova libro, estas efika propagandilo por Esperanto en publikaj kaj lernejoj bibliotekoj. Diversaj bibliotekoj senpere mendas la libron de la Centra Oficejo, sed plejparte ili mendas la libron pro petoj de Esperantistoj. Ĉu la nova libro troviĝas en via biblioteko? Se ne, petu!

Harry T. Leeper instruas Esperanton en 'East Fairmont High School', W. Va., al grupo de studentoj kiuj nomas sin la Interlingva Klubo.

Seattle, Wash., spertas novan viglan agadon por Esperanto. *S-ro F. Carlson* gvidas publikajn kursojn, kaj *S-ro D. Richardson* gvidas kurson ĉe la Universitato.

Sukcesis pri EANA-Atestoj: Atesto pri Lernado — *Raymond Canon*, London, Ont. Atesto pri Kapableco, kun Rajto de Daŭra Instruado — *E. C. Pollock*, Fall Brook, Cal., kaj *S-ino E. D. Wainman*, Little Genesee, N. Y.

ESPERANTO-KRONIKO

La Lima Esperanto-Asocio, Lima, Ohio, plej imitinde elstaras kiel bona kaj fidela Esperanto-grupo en Usono. Ili daŭre propagandas Esperanton en Lima, sub la sperta kaj lerta prezidanteco de D-rino Beecher. Ili jam tre sukcese gastigis EANA-Kongreson. Elkore ni salutas la novan oficistaron de tiu asocio: *D-rino Luella K. Beecher*, Prezidanto; *S-ino Harry Jay*, Unua Vic-Prezidanto; *S-ino Earl Sealts*, Dua Vic-Prezidanto; kaj *S-ino Arthur M. Vaughn*, Sekretario kaj Kasisto.

David D. Bartholomew, Bozeman, Montana, estis nomita Klub-Tradukisto por Esperanto de la 'American Collectors Exchange' kiu havas sidlokon en Minneapolis. Spite de grandaj malfacilaĵoj, David konstante kaj efike klopodas por Esperanto.

Donald R. Broadribb, Rochester, N. Y., skribis "leteron al la redaktoro" de Rochester Times-Union pri Esperanto, uzante informon el la nova flugfolio de EANA, "For Better International Understanding". Je la fino de la letero li donis la adreson de EANA. Malgranda inundo da informetoj alvenis al ni de Rochester, pri Esperanto. Ni ja rekomendas tian agadon al ĉiuj membroj de EANA.

Esperantistaj Artistoj, pri kiuj ĉiuj samideanoj devus informiĝi, estas *Robert Blackstone kaj Joy Postle*. Ili prezentas tre belan kaj originalan akton pri "Glamour Birds of the Everglades", antaŭ organizoj, kluboj, grupoj, kaj en teatroj, ktp. Ilia flugfolio pri la prezentado enhavas bonegan paragrafon pri Esperanto. Ni konsilas, ke vi interkonatiĝu kun ili (skribu Esperante aŭ angle), kaj sendu \$1 por du bele ilustritaj libroj, aŭtografitaj, pri "Glamour Birds of the Everglades". Unu dolaro estas tre eta prezo por tiom da arto, kun poemoj kaj priskriboj pri la kolorplenaj birdoj de la tropikolandoj. Sendu vian dolaron kun mendo al: *Robert Blackstone, Box 217, Orlovista, Fla.*

DEZIRAS KORESPONDI

Argentino. S-ro Jorge Bondone, Irigoyen 428, *Bell Ville* (Cordoba.) Junulo dez. kor. kaj interŝ. aĵojn kun Usonanoj.

Belgujo. S-ro G. Destray, Tolhuislaan 22, *Gent*. Poŝtoficisto, 23-j., dez. kor. kun usonaj junulinoj.

Bulgario. D-ro Kiril Dramaliev, str. Vrabĉa 10, *Sofia*. Dez. kor. pri reformoj en la sistemo de instruado.

Bulgario. S-ro Dimitar A. Popov, *Hajredin*, Orehovsko. 20-j. nova Esperantisto dez. kor. kun Usonanoj.

Ĉekoslovakio. Savo Kroupa, Nadrazni 40, *Ĉeb.* 16-j. skolto dez. kor. tutmonde, interŝ. PM kaj il. PK.

Ĉekoslovakio. Vaclav Pacanda, Bolevec 525, *Plzen*. Dez. interŝ. 5 mm "Kodak" kolorfilmon kontraŭ ĉekoslovakajoj.

Ĉekoslovakio. Rudolf Sochor, Holeĉkova 7, *Praba-Smichov*. Dez. interŝ. il. PK kun la tuta mondo. Certe respondas.

Danujo. S-ino Agnete Hermund, Adelvej 4, *Risskov v/Aarhus*. Dez. kor. precipe kun danoj en Usono.

Danujo. Frans Jaehger, Italiensvej 45, *Copenhagen S*. Dez. kor. tutmonde, ankaŭ kun genegroj en Ameriko.

Finlando. V. Eronen, *Kerkkoo*. Informo pri "novaj nomoj", originalaj kaj universalaj por ĉio kaj ĉiu. En Esperantujo ĉiam brilas la suno. Toleru trikot-novaĵon pri radio "ojo" kostumo.

Franĉujo. Roger Coleny, Esperanto-Delegito, *Gap*. Liveras ilustritan serion (18 bildoj) de PK kun Esperanto-teksto kontraŭ 6 resp. kup.

Germanujo. Erich Bergmann, Schwarzerweg 247, (22a) *Wuppertal-Elberfeld*, Brita Zono. Dez. kor. kun Amerikanajoj.

Germanujo. Albert Funke, Hochneukircher-str. 12, Otzenrath, Kries, Grevenbroich, Bezirk, *Dusseldorf* (22a), Brita Zono. Malnova germana Esp-isto mankas ĉion. Helpu al mi!

Germanujo. Gerd Müller, Schwanenstr. 34, (22a) *Velbert* (Rheine), Brita Zono. 18-j. studento dez. kor. il. PK.

Germanujo. Georg Englert, Rathochstr. 59, *Munchen-Obermenzing*, U. S. Zono. Dez. vendi akvarel-pentraĵojn en U. S. A. Skribu al li pri prospekto.

Japanujo. Prof. Kiyosi Ikegawa, 1618 Kori, Neyagawacho, Kitagawachi-gun, *Osaka-fu*. Administranto pri "social work" dez. kor. kun samfakanoj nur pri tiu okupo.

Afriko. Jorge A de Moraes Carvalho, c/o Alfandego, *Lobito*, Angola, Portugalga Okcidenta Afriko. Dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj.

Svedujo. S-ro Åke Blomberg, Lortkollsgatan 2, *Lidköping*, 27 j. svedo dez. kor. kun gesamideanoj en Ameriko.

RARE FIND IN ESPERANTO RECORDS

IMPORTANT TOPICS AND SPEAKERS

Only by unusual good fortune have we succeeded in acquiring several of each of the following unique Esperanto records — the last remaining stock from previous European manufacturers. These are perfect, unused, 2-sided 12-inch records, made by the famed natural-voice "Tri-Ergon Foto-Electro Process" — masterpieces of recording art. We can supply only those members who send their orders early, while the limited stock lasts.

"Tri-Ergon Record" No. 1, price \$3.85 postpaid.

(1-A) *Prologo por la Dek-Naŭa Universala Esperanto-Kongreso en Danzig*, 40th Jubilee. Dramatic prologue to the Congress, by Edith Herrnsstadt-Oettingen.

(1-B) *Parolado pri la Inventaĵo "Tri-Ergon" por fari Foto-Elektron-Diskojn*. Important for its popular-science manner of presentation, using many simple scientific words. Speech by Edith Herrnsstadt-Oettingen.

"Tri-Ergon Record" No. 2, price \$4.35 postpaid.

(2-A) *El la Parolado de D-ro Zamenhof en la Unua Universala Kongreso de Esperanto*, 1905 at Boulogne sur Mer. There, Zamenhof presented "Preĝo sub la Verda Standardo." Speech recited by Edith Herrnsstadt-Oettingen.

(2-B) *Parolado de D-ro Edmond Privat en la 40-a Jubileo de Esperanto, Danzig* about Zamenhof, Esperanto progress, and the universal spirit of understanding. Recorded by Dr. Privat, famed Esperantist orator.

"Tri-Ergon Record" No. 3, price \$5.50 postpaid.

(3-A) & (3-B) *Klarigoj pri la Prononcado kaj Akcentado de Esperanto*. One of the most unique and helpful records ever produced in Esperanto. Dr. Privat gives examples and counsel about the pronunciation of Esperanto to many peoples: Hungarians, Germans, Slavs, Poles, Czechs, Italians, Englishmen, etc. He follows with illustrations and examples of Zamenhof's personal manner of pronunciation. We have only eight of these records. Order at once.